Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2021 | n-ro 09-10 (1395-1396)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete: esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa): +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru

**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete: rischneller@gmail.com
Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Kotizoj 2021

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |
| Kostariko | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.
**> Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Brandon Sowers
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto:* Alexandra Paz
*Ceteraj membroj:* Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Saioa Escobar, Paz

**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Vic-kunordiganto:* Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la septembra-oktobra numero de *Sennaciulo*, kun unuaj raportoj pri la jubilea kongreso. Por tiuj, kiuj deziras tuj pli detale scii tion, kio okazis dum la laborkunsidoj, eblas spekti ilin en la jutuba kanalo de SAT. Ĉi-jare eĉ pli ol dum la pasinta sentiĝis sopiro al denovaj ĉeestaj renkontiĝoj. Do, se tio ankaŭ estas via kazo, ne hezitu tuj plenigi la kunsenditan aliĝilon por la 95a SAT-Kongreso, kiu okazos en Moskvo inter la 30a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2022

Post du artikoloj kun individuaj pripensoj pri la jubileo, venas ĉi-foje relative granda kvanto da reagoj kaj opini-artikoloj. Tio montras, ke Sennaciulo daŭre havas utilon por detala interŝanĝo de informoj kaj ideoj, per kiuj ni ĉiuj povas lerni de la aliaj.

Ĉi tiu numero estos la tria presita sude de la Pireneoj. La somerpaŭzo kaj kongrespreparoj iom malfruigis la ĉi-rilatajn klopodojn. Post ĉiuj bezonataj teĥnikaj interŝanĝoj, pri kiuj vi povos detale legi en venonta numero, la du plej malfruantaj numeroj estis presitaj. Ili supozeble forvojaĝos al viaj leterkestoj dum tiu ĉi estas finpreparata.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo:**

SAT-anoj tostas je la centjariĝo de sia asocio dum la fermo de la kongreso. Kunmetaĵo el pluraj ekrankopioj.

# Enhavo


**94a SAT Kongreso**
4 Gvidrezolucio
4 Deklaracio
**Centjariĝo de SAT**
5 SAT fariĝas centjara
6 SAT centjara
**Opinioj - Reagoj**
7 La regmanieroj kaj personkulto de Jozefo Stalin
11 Perdita tradicio
12 Ludkortoj
13 Sed Kiel ?!
17 La penso de Louis de Bonald ne forĵetiĝis en la rubujon de la historio, ĝi revenis pli forta ol iam ajn !
18 COVID-19 : la sensenceco
**Tra la mondo : Latinameriko**
20 Kubo: Manifesto por politika revolucio
**Tra la mondo : Mezoriento**
22 Ree Noruzo
23 La malliberuloj de la PLK
**Historio**
25 La Pariza Komunumo
28 Dekreto pri la cedo de forlasitaj laborejoj al laboristaj kooperativaj societoj
29 Filmo pri franca aviada eskadro
30 Inaŭgurita en Barcelono placo memore al anarkiistino
**Beletro**
30 Hispana somero
32 Verdaj bomboj kontraŭ grizaj katakomboj
34 Bravi abbracciatevi come eravamo abituati a fare*
**Komunista Frakcio**
36 Same kiel SAT, centjariĝas kaj festas en 2021... PCP !
**SAT-anoj aktivas**
37 Ni aperigis artikolojn de Sennaciulo en la japanan
38 La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo
**Nekrologo**
39 Nelida Beatriz Monasterio (35078)
39 Jomo Ipfelkofer (1947-2021)
**Tra Esperantio**
40 Praktikado de la lingvo en Kvinpetalo
**El la SAT-administrejo**
42 Donacintoj
**Beletro**
43 Poemo de Juhász Ferenc (1928-2015)
44 La bordo blanka, la bordo nigra



Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al: **sennaciulo.redaktejo@gmail.com**

### 94-a Kongreso de SAT

# Gvidrezolucio

La 94-a SAT-Kongreso okazinta perinterrete de la 23-a ĝis la 26-a de julio 2021:

– salutas la organizadon de reta kongreso en dua jaro sinsekve, vokante al kiel eble plej amasa partopreno – organize kaj ĉeeste – en laŭeble surloka kongresado jam en 2022;

– instigas aliĝi al la venontjara kongreso en Moskvo inter 2022-07-30 kaj 2022-08-06;

– petas la Plenum-Komitaton kaj Eldonan Fakon Kooperativan de SAT pritaksi la eblon pli ol ĝis nun eldoni librojn kaj broŝurojn en bitlibraj formatoj taŭgaj por legiloj, kaj ellabori starpunkton pri la prezdifinado resp. senkosteco de tiaj eldonaĵoj;

– instigas la membraron pli engaĝiĝi en provizado de la SAT-retejo kaj redakciaj laboroj por *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo* .

### 94-a Kongreso de SAT

# Deklaracio

La 94-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazinte perinterrete de la 23-a ĝis la 26-a de julio 2021:

– konfirmas la daŭrantan sindediĉon de SAT al la emancipaj celoj, kiuj motivis ĝian fondon antaŭ cent jaroj;

– konstatas, ke kapitalismo kaj naciismo, foje eĉ faŝismo, plu grave baras la vojon al solvo de la problemoj ligitaj al klimatŝanĝiĝo, kiujn frontas la homaro;

– bonvenigas la progreson de la scienco kaj la ektrovon de vakcino kontraŭ KOVIM-19, kaj postulas, ke la vakcinoj estu distribuataj juste tra la mondo, kaj ke la farmaciaj kompanioj ĉesu profiti de la katastrofo;

– tiucele postulas senpatentigon de la vakcinoj, tiel ke ili povu esti libere produktitaj far la popoloj mem;

– alvokas ĉiujn partiojn en la konflikto isreala-palestina sin deteni de teritoriaj aneksoj kaj militaj agoj, kiuj malproksimigas akordiĝon de la konfliktantaj grupoj;

– apogas la lukton de la popolo de Okcidenta Saharo kontraŭ la okupacio fare de Maroko kaj deziras la tujan liberiĝon de tiu, kiu estas nomata la lasta kolonio de Afriko, kaj alvokas al reamikiĝo inter amba popoloj;

– solidariĝas kun la lukto de la sindikato Kannama en Japanio por laboristaj rajtoj kaj kontraŭ ŝtata subpremo de sindikataj agadoj, kaj apogas ĝian strebon konstrui tendencon por laboristaj sindikatoj laŭindustriaj;

– kondamnas strebojn de la registaroj en Hungario kaj Pollando, kiuj celas diskriminacie limigi la bazajn civilajn rajtojn, precipe tiujn de gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj (GLAT).

# SAT fariĝas centjara

Cent jaroj da luktoj kaj klopodoj por transdoni tiun eksternacian vidon al plej multe da homoj. *SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj aĝadkapablo!* estas la slogano, frapfrazo de SAT.

Fakto estas, ke ekde nia infanaĝo ni ekkonas kadrojn, strukturojn. Etaj infanoj estas petataj meti kune la bluajn lignopecojn, kune la ruĝajn, kune la flavajn. Meti kune la triangulojn, kune la rektangulojn, ktp. Fakte preskaŭ ĉiuj lernaktivecoj konsistas al ordigo, disigo kaj grupigo, laŭ raciaj kriterioj. Ni malkovras la ĉirkaŭaĵon per tiaj laboroj enlernejaj. Nia menso ŝatas tion, bezonas tion por kapti la mondon. Pli poste ni lernas geografion, ni lernas la landlimojn kaj la ĉefurbojn kaj alvenas al la ideo, ke en Kamerunio loĝas kamerunianoj, en Kongo loĝas kongolandanoj. Tamen tio estas for de la realo. La realo estas multe pli malpreciza kaj evoluema. En ĉiuj lernobjektoj. Se instruisto insistas pri tiu ne klara situacio, la lernantoj penas kompreni. La lernantoj ĉiam preferas klarajn dirojn: la afero estas tia, punkto fino. Enkonduki la nebulecon de la realo estas defio por la instruisto. Se li aŭ ŝi faras tion, la studentoj diros: tiu instruisto ne instruas bone. Sed: en sia plenkreska vivo tiu studento malkovros la evoluemon de la realo kaj devos konstati, ke tiu ne rigida instruisto pravis. Tio estas la defio por ĉiuj, ĉu instruistoj, ĉu studentoj, kiuj fariĝos plenkreskaj personoj. Kompreneble, por infanoj la gvidantaj plenkreskuloj devas kompensi tiun ordigan laboron per kreaj aktivecoj, libera kantado, manlaboro, aŭskultado de muziko, diskutoj kaj debatoj, akcepto kaj analizo de emocioj diversaj, korpo-ekzercoj,... mi ne diras la vorton sporto, ĉar sporto tro ofte rilatas al venko de skipo alinacia....

En nia esperantista etno estas francoj, germanoj, rusoj, japanoj.... Laŭ pasporto. Ni ĉiuj aŭdis de Zamenhof: ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Mi konstatas, ke la transiro al tia eksternacia pens-maniero estas malfacila vojo, dekliva pado. Mi skribas tion en la 14-a de julio, nacia festo franca, dum kiu oni celebras la nacion, la brilan Historion de la lando, la sukcesojn kaj la akirojn, kaj forgesas la krimojn kaj trompojn kaj rabojn... Parenteze, mi ne estas francino. Por mi kiel svisino, la vorto *nacio* havas neniun signifon, ĝi estas sengusta esprimo. Multaj homoj amas sian naskiĝlokon – tio estas natura fenomeno – kaj ili sentas perfidon al ĝi, kiam ili forlasas la lernitajn kadrojn kaj transiras al eksternacia pens-maniero. Ili hezitas, bremsas, rifuzas... Kelkaj iras nur la duonon de la vojo. Patriotismo estas pli forta ol aparteno al tutmonda familio. Tia evoluo estas akcepto de nova paradigmo, kompleta ŝanĝo mensa. Nova naskiĝo. Tiu vojo estas longa. Al tiuj, kiuj iris tiun vojon, mi diras: havu paciencon kun la novuloj, kiuj havas la vojon antaŭ si.

Fine mi devas fari komparon: la sano de la planedo Tero postulas de ni kompletan ŝanĝon de nia vivstilo, se ni volas, ke plu vivu kelkaj homoj sur tiu planedo. Nova paradigmo, nova viv-stilo, sobra kaj respektoplena. La vojo estas longa, sed ni devas kuri, ĉar la afero urĝas.

Mi deziras longan vivon al SAT, sukceson, ardon al sia celo, eltenemon, daŭripovon.

Mireille Grosjean (35899)



# SAT centjara

SAT, nun centjara, devenas el epoko, en kiu klasbatalo por granda segmento de la publiko, ankaŭ esperantista publiko, estis la "motoro de la historio". Multnombre homoj klopodis ligi la aferon de Esperanto kun la laborista afero, tiutempe la plej fundamenta maldekstrisma strebado. La vortumoj en la fondaj dokumentoj de SAT spegulas senpere la etoson de revolucia epoko. Se tio aspektas anakronisma al iuj, necesas konsili singardon. Ni scias, ke en la landoj, kie Esperanto plej disvastiĝis, la emfazoj en maldekstremaj movadoj ŝoviĝis, kaj laboristklasa politiko iĝis unu agadbranĉo inter pluraj, ne de ĉiu la plej atentata. Sed la kondiĉoj en tiuj landoj ne estas tiuj de la tuta mondo. Kaj oni atentu, ke jam dekomence la kerna politika mondrigardo en SAT estis plurfaceta. Kie SAT situis, situas kaj situos en la ideohistorio de Esperanto? Resume – per kelkaj notvortoj:

– **sendogmeco**: SAT celis jam unuatempe kontraŭefiki dogmemajn sintenojn ĉe siaj membroj. Laŭ sia statuto: "SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj." Kiu hodiaŭ malfermas numeron de *Sennaciulo* , povas konvinkiĝi, ke SAT plu alstrebas tion. La temamplekso kaj la relativa manko de rekonebla politika linio atestas ĝin. SAT estas asocio de malsamideanoj. Interbatalemo de tendencoj karakterizas la maldekstrulojn en 2021 kiel en ĉiuj antaŭaj tempoj, kaj ne alie okazas en SAT.

– **antaŭfigura politiko**: Ĝis antaŭ kelkaj jaroj "antaŭfigura politiko" estis ne vaste konata nocio. Ĝi populariĝas de kelkaj jaroj en anarkiismaj kaj aliaj medioj kaj referencas al funkcimanieroj de organizo kaj sociaj rilatoj, kiuj penas respeguli en la nuno la estontan socion, kiun grupo alstrebas. La deziro estas enkorpigi en la daŭranta politika praktiko de movado formojn de sociaj rilatoj, decidado, kulturo kaj homa sperto, kiuj konsistigas la finan celon. La koncepto, se ne la termino, estas multe pli malnova. Antaŭfiguran politikon oni ofte resume klarigas per citaĵo atribuata al Gandhi (kvankam ĝi fakte parafrazas eldiron de li): "Estu la ŝanĝo, kiun vi volas vidi en la mondo." SAT mem formulis la koncepton en sia antaŭfondiĝa dokumento de novembro 1920, *"Liberiga Stelo" al la Verdruĝuloj* : "ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun fakton por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio". La egalisma kaj malaŭtoritatema etoso en SAT antaŭfiguras tiun de emancipita socio, kiun membroj deziras.

– **kontraŭnaciismo**: Kiel konate, SAT estas asocio "sennacieca", sed ne "sennaciisma". La slogano "SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo" sur ĉiu kovrilo de Sennaciulo manifestas deziron anticipi praktike kaj jam nun socion, kiu metos naciismon malantaŭ sin. Sed multaj pozitive rilatigas sin ankaŭ al sennaciismo, nuntempe laŭ plimulta kompreno ombrela koncepto. Sennaciismo ekde la unuaj provoj fiksi ĝian konkretan enhavon strebis ĉirkaŭpreni ne nur radikalan kontraŭnaciismon, sed ankaŭ pozitivan alternativon je ĝi. Ĝi frue prezentis teniĝon oftan en hodiaŭaj progresemaj rondoj, kiuj multloke eksplicitigas la kosmopolitismon. Ankaŭ ĉi-rilate la tradicio de SAT restas moderna.

– **mondmastrumado**: Unu aspekto de la lantia sennaciismo, kiu fuĝis el la atentofokuso poste, estas la ideo de "mondmastrumado". Laŭ la difino de Lanti en sia *Manifesto de la Sennaciistoj*: "*Sennaciismo* – Kultura doktrino, kies ĉefaj celoj estas: 1) Malapero de ĉiuj nacioj, rigardataj kiel sendependaj, suverenaj unuoj; 2) Mondmastrumado kaj racia utiligado de ĉia energio kaj materio profite al ĉiuj homoj de nia planedo; 3) Unuecigo je ĉiuj mezuroj kaj kalkuliloj; 4) Praktikado de sennacieca lingvo (esperanto) kun la celo, ke ĝi fariĝu la sole uzata kulturlingvo." Kredeble Lanti imagis mastrumadon de energio kaj materio kiel siaj samepokanoj – produktivisme. Sed en sia ĝeneraleco la eldiro plu validas. Aperas nun, en la epoko de tutmonda, ankoraŭ tro hezita ekreago je la klimata krizo, strebado al ĝuste tio: mondmastrumado. Sed nunepoke ekologia, postproduktivisma. Malfacile tio progresas, malgraŭ urĝeco. La procezon nepretervideble bremsas la ĉiam ankoraŭ furiozanta naciismo, el ĉiuj ideologioj verŝajne tiu, kiu plej saturas la mondon nun, ne alie ol antaŭ preskaŭ cent jaroj, kiam Lanti antaŭvidis: "Ne forpasos multaj jardekoj, ĝis mondmastrumado estos ebla *objektive* ; sed tiam malebligos ĝin la *subjektiva* forto, nacieca. Oni ja povas konstati la daŭre kreskantan malekvilibron inter jenaj du faktoroj: 1) homa menso intensege saturata je nacieco; 2) daŭra malvolviĝo de la scienco kaj tekniko, kies rezulto, inter aliaj, estas tempe malgrandigi la

distancojn. Tia stato de malekvilibro povos tute kaosigi la socian vivon kaj minaci je pereo la normojn de civilizo."

– **memklerigo**: Sian kulturan kaj klerigan agadon SAT plenumas sen moninjektoj de ekstere, sen devi postĉasi potenciale dependigajn subvenciojn. Post la krizo de la 30-aj jaroj, en kiu SAT sukcesis ne subordiĝi sub la 3-an Internacion, ĝi gardis sian memstarecon, okupas politikan spacon ampleksan, plurtendencan, en kiu alfrapiĝas kontraŭdiraj opinioj.

Malgraŭ la foresto de politika linio en SAT, eblas singarde aserti, ke ĝi okupas difineblan politikan spacon en la Esperanto-medio. SAT lokiĝas ĉe la kosmopolitisma poluso de tio, kion oni tradicie nomas la "interna ideo". Tiu neniel estas unusignifa koncepto, sed kovras grandan ideologian terenon. Ne mirinde ĉe tiom da ideologia diverso inter la esperantuloj. Kosmopolitemaj estas tiuj inter ili, kiuj orientiĝas al la praa zamenhofa celo "unuigi la homaron", diference de tiuj partikularismaj esperantuloj, kiuj volas enkonduki ĝin kiel rimedon por bonetosigi la rilatojn inter la (esencisme imagataj) nacioj, etnoj, civilizacioj. La nocio "kosmopolitismo" taŭgas en ĉi tiu kunteksto klarigcele, des pli, ĉar nuntempe ĝi estas pli pozitive konotaciita ol en la epoko de Zamenhof kaj Lanti, kiuj ambaŭ rilatis al ĝi sindistancige.

SAT havas ankaŭ malfortojn: Okazas ofte, ke SAT-anoj ensociiĝas en la de UEA dominata "movado", ensorbante ties specifajn ideojn pri Esperanto kaj ĝia supozata celo – kaj pli poste SAT-aniĝas. SAT kovas avangardajn ideojn, sed SAT-anoj nur diversgrade alproprigas ilin. Plia malforto de SAT estas, ke kelkaj SAT-anoj akceptas aliulan imagon pri sia asocio: ke ĝi estas "faka asocio".

En la postfinvenkisma epoko, kontraŭnaciisma kleriga agado povos esti laborkampo por esperantuloj – kaj ne nur SAT-anoj – volantaj engaĝiĝi en la mondo. Agado bazita sur lingvopolitiko ne estas senalternativa. Ŝajnas sencodone koncepti kaj prezenti Esperanton kiel instrumenton de praktika kosmopoliteco kaj kontraŭnaciisma reflektado, je la dispono de ĉiu, kiu volas pli eksteriĝi el sia partikulara vivĉirkaŭaĵo, ol eblus sen ĝi. Jen ideo, kiu tiriĝas kiel ruĝa fadeno tra la historio de SAT.

Gary Mickle (35083)

**Opinioj - Reagoj**

# La regmanieroj kaj personkulto de Jozefo Stalin



**Generalissimo (ĉefgeneralo) Jozefo Stalin**

## Stalin – ĉefo de Sovetio

Sekve de la artikolo "Josef Stalin kaj nia socialismo" ( *Sennaciulo*, 03-04, 2021), kiu apologias J. Stalin-on kiel multvaloran gvidanton de Sovetio, transformiĝantan ĝin en grandegan ŝtaton de la mondo, en kiu komencis realiĝi streboj de la popolo al pli bona, feliĉa vivo. La aŭtorino de la artikolo estis Marija Prilepskaja (forpasinta la 1-an de septembro 2020), 73-jaraĝa aktivulino de la Esperanto-movado en Samara (Rusio).

La artikolo tre entuziasme pritaksas la gvidrolon de Stalin en la konstruado de la socialismo en Sovetio kaj en organizo de la venko en la Granda Patriota Milito. Ŝi citas eĉ la vortojn de la angla politikisto W. Churchill, ke J. Stalin "estis la geniulo kaj neŝancelebla militestro". Kompreneble, J. Stalin ne ĉiam estas glorigata en biografioj memorigantaj liajn vivon kaj aktivecon. Tio okazadas en senkompromisaj malamikaj biografioj, kaj ankaŭ ekzistas moderaj pritaksoj de lia agado. Konsiderante historian scion-malscion, precipe de junaĝuloj, mi plue daŭrigas la temon pri Stalin-agadmanieroj, sed

kun rigardo entenanta historiajn faktojn kaj eventojn.

## La konkerinto de la regpovo

Stalin naskiĝis en Gori (Kartvelio) en 1878. Li partoprenis dekomence en revoluciaj movadoj. La revolucion de oktobro 1917 gvidis Lenin, Trotskij kaj Stalin. En 1922 Stalin estis nomumita ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio. Post la morto de Lenin (1924) li sukcesis firmigi sian potencon per forigo siajn rivalojn kaj kontraŭulojn.

Stalin estis la malplej teoria el la revoluciaj gvidantoj kaj li pli zorgis pri praktiko ol pri ideoj. Li kreis naciisman kaj totalisman version de la marksismo, kreante sian grandan personkulton. Kaj estis favora al la tiel nomata socialismo en unu lando. Kontraŭe, Trotskij pledis por permanenta internacia revolucio kaj por laborista movado disvastiĝanta tra la mondo. Kiam Trotskij, lia ĉefa kontraŭulo, perdis sian pozicion en 1925 (li estis ekziligita), Stalin komencis politikon pri firmigo de sia potenco kaj establo de stalinismo. Stalinismon oni nomis evoluo de leninismo, kaj ofte estis uzata en Sovetio la unuiga esprimo “marksismo-leninismo-stalinismo”. La politika sistemo establita de Stalin estas klasifikita de historiistoj kiel totalisma kaj kiel aŭtokratio. La totalisma sistemo baziĝis sur absoluta kontrolo de la ŝtato. La potenco en la lando fakte apartenis al la komunista partio kaj, finfine, al Stalin mem. Stalin donis konsiderindan potencon al la militistaro kaj al la subpremaj aparatoj de la ŝtato. Ekde 1929 oni monopoligis ĉiujn ŝtatajn potencojn (juran, leĝdonan kaj plenuman). La ŝtato malpermesis privatajn posedaĵojn: teron, bankojn, servojn ktp.

## La fortikigo de la personkulto

La amaskomunikiloj de Sovetio estis uzataj kiel efika metodo de la stalinismo por regi la loĝantaron. Ili estis kontrolataj de la registaro, kiu ne permesis kritikajn informojn. La reĝimo konstruadis veran kulton al la personeco de Stalin uzante amaskomunikilojn kaj aliajn rimedojn de propagando. Estis multaj portretoj, fotoj kaj flagoj kun lia bildo, kiuj lin priskribis kiel “La Patron de la Nacio”.

La plej konata karakterizaĵo de la stalinismo estas ĝia uzo de subpremo kaj teroro por subteni sian regadon. Jam de kiam Stalin ekregis, li komencis organizi la eliminon de siaj politikaj rivaloj ekzistantaj ene kaj ekstere de la partio. En tiuj unuaj elpurigoj estis murditaj gvidantoj de la revolucio, militistoj, membroj de la komunista partio kaj intelektuloj. En 1933 kaj 1939 okazis la plej intensaj elpurigoj. Stalin uzadis la politikan policon NKVD (Popola Komisariato pri Internaj Aferoj) por efektivigi tiujn arestojn. La NKVD detektis, arestis, esplordemandis kaj ekzekutis la supozatajn perfidulojn. Krom tiuj mortigitaj, miloj da disidentoj estis enfermitaj en la gulagoj (“reedukaj” tendaroj), kie ili devis fari devigan laboron.

La kaŭzoj de la stalinismo estas ligitaj al la potenco de Stalin kaj al lia personeco. Li disvolvis veran persekutmanion ĉar li estis konvinkita pri la ekzisto de konspiroj por murdi lin. La subprema aparato de la ŝtato faris deportadojn, atencojn, elpurigojn konservantajn lian reĝimon ĝis lia morto. Krome, Stalin sukcesis krei kulton al sia persono, kiu igis parton de la loĝantaro konsideri lin vera patro. Stalin certigis, ke lia personeco estas obeata kaj respektata kvazaŭ dia. La tuta stalinisma politiko sufokis ian novan gvidadon kaj faris la figuron de Stalin kulta objekto.

## Ekonomia disvolviĝo

Rusio estas unu el la malmultaj eŭropaj landoj, kiuj apenaŭ rimarkis la Industrian Revolucion. Komence de la 19-a jarcento ĝi estis ankoraŭ elstare kampara kun feŭdaj strukturoj en multaj kazoj. La celo de Stalin estis igi Sovetion mondpotenco. Por plenumi la celon, Stalin bezonis meti la tutan ekonomian sistemon en la manojn de la ŝtato. Tiel, Stalin ekregis la pezan industrion kaj la agrikulturan sektoron, malpermesante ajnan formon de privata ekspluatado kaj kontrolante ĉiujn naturajn kaj homajn rimedojn de Sovetio. Do la registaro estis la sola posedanto de la varoj. La tuta ekonomia




**Kutimaj kaj solenaj manifestacioj ĉiam marŝis kun trograndigitaj portretoj de Stalin**



**La mondmilitaj Aliancitaj Potencoj estis reprezentitaj per la "Grandaj Tri": (dekstre maldekstren) brita ĉefministro Winston Churchill, usona prezidanto Franklin Delano Roosevelt kaj sovetia ĉefgeneralo Jozefo Stalin. La renkontiĝo en Teherano (1943).**

ordo trapasis ŝtatan kontrolon.

Stalin atribuis grandan gravecon al la peza industrio. Liaj politikoj sukcesis plibonigi la ekonomian situacion, transformante la landon en mondan potencon kaj atingante multe pli bonajn rezultojn ol tiuj de postaj gvidantoj. Agrikulturo, male, suferis malsukceson. La kampoj estis kolektivigitaj kaj kvinjaraj planoj kreiĝis por kontroli la kultivaĵojn. Ekzistis du specoj de planoj: la kolĥozo, tero, kiun la posedantoj devis doni al la ŝtato kontraŭ salajro, kaj la sovĥozo, societumitaj bienoj.

Historiistoj distingas inter la granda industria progreso, kiun atingis la stalinismaj politikoj, kaj la malriĉeco, en kiu oni loĝis en la kamparo. Ĉi tio generis ian kapitalismon kun sociaj klasoj depende de la laboro kaj la loĝloko. En kelkaj jaroj, la makro-ekonomiaj datumoj kreskis ĝis la punkto, ke aliaj landoj komencis paroli pri "sovetia miraklo". Tion helpis milita produktado, kiu donis rimarkindan akcelon al la peza industrio. Tiel, la loĝantaro povis akiri iujn komfortojn. En la 1930-aj jaroj, antaŭ la dua mondmilito, ne estis senlaboreco kaj estis neniuj komercaj cikloj. Iuj intelektuloj, oficialuloj kaj inĝenieroj povis amasigi malgrandajn riĉaĵojn.

## La Granda Teroro

La Granda Teroro de la 1930-aj jaroj komencis post la morto de S. Kirov, eminenta funkciulo de la Komunista Partio. S. Kirov estis murdita en 1934, kaj Stalin uzis lian morton por reliefigi la danĝerojn de la kontraŭkomunisma movado kaj plifortigi sian sovetian politikon. Stalin celis suspektindajn membrojn de siaj kabineto kaj registaro, soldatojn, pastrojn, intelektulojn kaj aliajn. Tiuj kaptitoj de la NKVD estis turmentitaj, malliberigitaj aŭ mortigitaj. La Granda Teroro forigis multajn gravajn figurojn el la registaro.

Dum la Granda Teroro disvastiĝis eĉ paranoja agado. Civitanoj denuncis sin reciproke kaj la kaptitoj ofte montris personojn ĉe najbaroj aŭ kunlaborantoj kun espero savi sian propran vivon. Ofte, oni provis publike konfirmi la kulpon de la akuzitoj kaj certigis, ke familianoj de tiuj akuzitoj restos socie malakceptataj, eĉ se ili sukcesis eskapi areston. Ankaŭ ĉi tiu purigado de la milita gvidantaro grave influos la militan efikecon de Sovetio dum la Dua Mondmilito.

La individuaj kaj amasaj ŝtataj atencoj estis efektivigitaj por disvastigi teruron kaj teni la civitanojn disciplinitaj. La procesoj okazintaj inter 1936 kaj 1938 montris, ke ĉiuj akuzitoj estis trovitaj kulpaj kaj estis ekzekutitaj. Ankaŭ multaj el la herooj de la revolucio, kunuloj de Lenin, estis juĝitaj kaj poste ekzekutitaj. Historiistoj taksas, ke antaŭ 1939, eĉ 70% de la membroj de la Centra Komitato de 1924 estis forigitaj kaj 90% de la armegeneraloj havis la saman sorton aŭ estis senditaj al la gulagoj. Unu el la plej malbonaj jaroj estis 1937, kiam pli ol 1,7 milionoj da homoj estis arestitaj pro supozataj politikaj krimoj. Pli ol du milionoj perdis sian laborpostenon kaj ĉirkaŭ 700 000 sovetianoj estis ekzekutitaj. Estas tre malfacile taksi la totalan nombron de mortigitaj personoj, sed la plej malaltaj determinoj kredas, ke Stalin mortigis 20 milionojn sole dum la Granda Teroro. Tio estas unu el la plej grandaj ŝtate sponsoritaj murdadoj en la historio.

## La Dua Mondmilito

La plenskalan invadon de Sovetio iniciatis germanaj hitleraj trupoj la 22-an de junio 1941. Tiam komenciĝis la tiel nomata "Granda Patriota Milito". Kiam Hitler invadis Sovetion, Stalin kuniĝis kun la Aliancitaj Potencoj, Britio kaj Usono, kaj ili kune kontraŭbatalis la malamikon. Komence (1941-1942) la germana armeo rapide avancis orienten tra Sovetio. La germanoj estis senkompataj en sia okupacio kaj disrabis la konkeritan teritorion. Stalin decidis ĉesigi la invadon bruligante farmobjektojn kaj vilaĝojn en la vojo de la germana armeo. Ĉi tiu detruita tero

bedaŭrinde detruis ankaŭ la hejmojn kaj vivrimedojn de rusaj homoj, kreante amasajn senhejmajn rifuĝintojn.

Ĝuste tiam, kiam la germana armeo atingis la urbegon Stalingrado, kie daŭradis en 1942-1943 la plej grava batalo kaj komencis la retreto de la germanoj okcidenten. La batalo ĉe Stalingrado prezentas, komune kun la batalo antaŭ Moskvo (1941) kaj la batalo en Kurska arko (1943), la plej grandan kaj decidan kunpuŝiĝon en la orienta batalfronto. La soveta armeo daŭre antaŭenpuŝis la germanojn en Berlinon, kie finiĝis la Dua Mondmilito en majo 1945.

La viktimoj de Sovetio en la Dua Mondmilito nombras sume 23 200 000 kaj nur la falintaj soldatoj 10 700 000. Komparo kun la Aliancanoj (Britio kaj Usono): sumaj viktimoj po ĉirkaŭ 500 000, soldatoj po ĉirkaŭ 400 000. Post la fino de la Dua Mondmilito, la akirita venko estis uzata de Stalin kiel propaganda armilo. La sovetia reganto sukcesis aneksi la baltajn respublikojn, parton de Pollando, Besarabion kaj nordan duonon de Orienta Prusio. La orienteŭropaj satelitaj ŝtatoj teorie ricevis siajn proprajn registarojn, sed praktike ili ĉiuj obeis la ordonojn de Moskvo (escepte de Jugoslavio). Tiel Stalin formis veran sovetian imperion.



**Jozefo Stalin mortis en marto 1953. Centoj da miloj da homoj venis vidi lin en la maŭzoleo.**

# La kondamno de Stalin

Jozefo Stalin mortis la 5-an de marto 1953. Lia korpo estis enbalzamigita kaj poste entombigita en la Maŭzoleo de Lenin sur la Ruĝa Placo en Moskvo. Centoj da miloj da homoj partoprenis la funebron. La sistemo de kolektiva gvidado restis en Sovetio kaj reformoj de la sovetsistemo tuj estis efektivigataj. Oni komencis amaskonstruprojektojn, loĝejkonstruadon kaj stimulis kampulproduktadon. La novaj gvidantoj serĉis interproksimiĝon kun Jugoslavio kaj pli amikajn rilatojn kun Usono, traktante negocitan finon al la Korea Milito en julio 1953. Oni dekretis amasamnestion por la nepolitika krimularo, kaj reformis la ŝtatsekurecon kaj la gulagan sistemon, kie la torturo estis malpermesita en aprilo 1953.

Georgij Malenkov, sovetia ĉefministro, kondamnis la Stalin-an personkulton en marto 1953. La ĉefa ŝtata gazeto *Pravda* retenis sian laŭdon de Stalin kaj komencis kritiki lian personkulton. Stalingrado estis nomita Volgogrado. En 1956, la unua sekretario de la Komunista Partio, Nikita Ĥruŝĉov, prononcis sian "sekretan paroladon" titolitan *Pri personeco-kulto kaj ĝiaj konsekvencoj* en la fermita sesio de la 20-a Partia Kongreso. Li ripetis tiujn denuncojn ĉe la 22-a Partia Kongreso en oktobro 1962. En oktobro 1961, la korpo de Stalin estis forigita de la Maŭzoleo kaj entombigita en la Kremla Mura Tombejo, en loko markita nur per simpla busto.

Malgraŭ la ekonomiaj atingoj, la kruelaĵoj faritaj de Stalin estis granda ŝarĝo por Sovetio. Pro tio, Nikita Ĥruŝĉov denuncis la krimojn faritajn dum la stalinismo. La reformoj, kiujn la nova reganto entreprenis por provi mildigi la damaĝojn de la antaŭa epoko, estis: forigi la gulagojn, ŝanĝi parton de la konstitucio, daŭrigi pli ĝustan agraran reformon kaj doni plian suverenecon al satelitaj ŝtatoj. Same, li daŭrigis la liberigon de la kaptitoj pro ideologiaj kialoj kaj la permeson al la politikaj ekzilitoj por reveni al la lando.

N. Ĥruŝĉov, en sia parolado, atakis Stalin-on, kondamnis lian tiranan regadon kaj malaprobis la krimojn de tiu epoko kontraŭ la Partio. Ĥruŝĉov anoncis la novan direkton, nomatan malstalinigo. Ĥruŝĉov emfazis, ke Stalin sukcesis gajni la Duan Mondmiliton, ĉar li industriigis Sovetion per vasta homa kosto. Ĥruŝĉov kondamnis la personkulton de Stalin, la stalinismajn subpremojn, la malpacan kunekzistadon kun la kapitalisma mondo, malaprobis la grandegajn administrajn kaj militajn kostojn, kiujn postulis la totalisma stalinisma kontrolo. Li kondamnis la fortigon de la cenzuro, precipe en literaturo, kinarto kaj aliaj artaj formoj. Ĥruŝĉov malkaŝis multajn el la teruraj kruelaĵoj faritaj de Stalin. Ĥruŝĉov disbatis la aŭron de grandeco, kiu ĉirkaŭis Stalin-on. La plua malstalinigo forigis la nomon "Stalin" el la urbaj,

strataj kaj aliaj geografiaj nomoj. Estis seniluziiĝe, ke la malstalinigo ne kondukis al pli granda liberaligo de la ruslanda vivo – ĉio estas relativa. La procezo ankaŭ reduktiĝis kun la forigo de Ĥruŝĉov el la potenco en 1964.

## Por fini

Ŝajnas, ke nuntempaj ruslandanoj forgesas, ke la totalisma politiko de Stalin kostis ĉirkaŭ 20 milionojn da homaj vivoj. Ŝajnas, ke lia populareco malrapide kreskas. Laŭ enketo ĉirkaŭ 45% de la rusoj nun opinias, ke la viktimoj sub Stalin “valoris la penon”. En la jaro 2008 nur 27% konfirmis tiun vidpunkton.

Mir-Ko (30094)



**Nikita Ĥruŝĉov, unua sekretario de la Komunista Partio (1953-1964) kaj ĉefministro de Sovetio (1958-1964) kondamnis Stalin-on kaj lian personkulton, lian tiranan regadon kaj liajn krimojn kontraŭ la Partio.**

# Perdita tradicio

**Ĉu unu el niaj tradicioj?**

Kiam mi eklernis Esperanton en 1986, mi de tempo al tempo legis diversajn artikolojn verkitajn de simplaj esperantistoj, kiuj rakontas pri siaj respektivaj spertoj kaj aventuroj rilate al la verda lingvo. Ili aperis ne nur en Esperanto-gazetoj sed ankaŭ en apartaj libroj. Ege variis la pritraktitaj temoj sed kio frapis min estis la renkontiĝoj inter esperantistoj dum kiuj, verŝajne, formiĝis bona rilato, agrabla etoso kaj eĉ amikeco. Mi estis juna, mi tre ŝatis la lingvon kaj mi apenaŭ konsciis pri la naiveco de la afero kvankam naiveco havas ankaŭ sian pozitivan flankon.

**Ne nepre literatura**

Por komencanto, estis facile al mi kompreni la lingvaĵon kaj verkstilon de la rakontoj ĉar la verkintoj utiligis la ĉiutagan vorttrezoron de Esperanto. Ili ja ne celis beletran efikon sed volis ĉefe kundividi kun la legantoj emocion kaj senton. Mi ne plu memoras titolojn de la koncernitaj libroj, sed aparte menciindas rubriko pri tiaj rakontoj en la fama kaj bunta El Popola Ĉinio kaj ankaŭ en aliaj periodaĵoj.

**Fascinita**

Tiaj rakontoj ja fascinis min pro ties simpleco rilate la lingvaĵon kaj la pritraktitajn temojn: vojaĝo, renkontiĝo, amikeco, geedziĝo, kreemo, sukceso en komerco... Kvankam la celita grupo estis ne nur komencantoj, mi estis ravita ekscii pri la spertoj de tiuj esperantistoj. Mi vojaĝis kun ili kaj imagis la agrablecon de la hazarda aŭ preparita renkonto inter esperantistoj. Ĉiu teksto estis preteksto revi pri ekzotika regiono des pli ke mi loĝas en malriĉa lando, kies registaro fermis nin en la t.n. socialismo en kiu ĉio mankis krom la senfinaj belaj predikaĵoj de la politikistoj. Tial Esperanto furoris en mia koro, per ĝi mi kapablis vojaĝi for kompare kun miaj samaĝuloj. Mi estis fiera viziti preskaŭ ĉiutage la poŝtoficejon por sendi multajn leterojn, mi ĝojegis pro la vizitoj de la poŝtisto en mia hejmo por liveri al mi dekon da leteroj el eksterlando en ĉiu semajno. Mi estis tre kontenta legi Esperanto-gazetojn kaj verki artikolojn por kelkaj el ili, de tempo al tempo. Salde, en tiu epoko, komencanto ne enuis, li aŭ ŝi (aĥ, ri – kiel proponas la nunaj reformemuloj?) sentis ke Esperanto funkcias kaj estigas homan senton.

**Sed la nuna komencanto perdiĝas**

Unuavide, la nunaj homoj, kiuj lernas Esperanton havas pli da ŝanco ol ni pro tio, ke ili disponas multajn eblecojn por rapide regi la lingvon. La interreto ofertas al ĉiuj senpagajn rimedojn kaj tuj uzeblajn komunikilojn. Bedaŭrinde,